



Bulteno

de Esperantista Klubo en Praha

Časopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 1/2015 (204)

8. 4. 2015

Esperanto v pořadu ČRo Plus Radiofórum

Radiofórum 19. prosince 2014 v 19:10



Má esperanto smysl, když je všude angličtina?

Tento týden uplynulo 155 let od narození lékaře Ludwiga Lazaruse Zamenhofa. Záměrem tvůrce esperanta bylo v roce 1887 vytvořit snadno naučitelný neutrální jazyk vhodný pro použití v mezinárodní komunikaci.



Ludwik Zamenhof
Foto: en.wikipedia.org

Přehrajte si celý příspěvek

Esperanto je nejrozšířenějším mezinárodním umělým jazykem, kterým se dorozumějí 2 milióny lidí ze 120 zemí světa.

Slovní zásoba esperanta pochází především ze západoevropských jazyků, zatímco jeho skladba a tvarosloví poukazují na silný slovanský vliv.

Esperanto má také mnoho společného s izolujícími jazyky, jako je čínština, zatímco vnitřní struktura jeho slov připomíná jazyky aglutinační, jako je japonština, svahilština nebo turečtina.

Jak esperantisté uvádějí, díky logické gramatice bez výjimek a zejména důmyslnému systému tvorby slov je možno si esperanto osvojit pětikrát až šestkrát rychleji než národní jazyky.

Má podle vás dnes ještě esperanto smysl, když za nejrozšířenější jazyk je obecně považována angličtina? Je čas esperanta už pryč, nebo teprve přijde? Jaké výhody má esperanto a proč se mu dosud nepodařilo stát se univerzálním jazykem, jak zamýšlel jeho zakladatel?

Hostem Petra Schwarz je v pátek 19. prosince od 19:10 předseda Pražského esperantského klubu Tomáš Břicháček.

19. prosince 2014 Český rozhlas Plus věnoval svůj pravidelný pořad Radiofórum tématu esperanta. Hostem ve studiu byl předseda našeho klubu právník a publicista Tomáš Břicháček, hosty na telefonu byl David Gruber, lektor v oblasti technické duševní práce, a Marek Blahuš, čínovník České esperantské mládeže a člen Mezinárodní akademie esperanta z Centra jazykového vzdělávání Masarykovy univerzity v Brně. Pořad moderoval Petr

Schwarz, kterému patří dík za celkově velmi přívětivé vyznění vůči esperantu. Přepsané úryvky z rozhovoru s Tomášem Břicháčkem uvádíme dále (str. 10 a 11). Celý pořad je dostupný na internetových stránkách Českého rozhlasu.

EL LA ENHAVO

Aktualaĵoj	2
Jubileo de Helena Štruncová	5
Esperanto v pořadu Radiofórum	10
Přemysl Pitter (K. Kraft).....	12
Magiaj arbustoj (P. Rak).....	15
Pragaj preĝoj (J. Cíhová-Hrdličková)	18
Zítří už bude všechno jinak (T.Břicháček)	20
Kuriozaĵoj	23

Klub esperantistů v Praze

bulteno.cs-retromusic.net

Schůzky v ul. Ve Smečkách 25
ve vybrané čtvrtky od 17 do 19 h.

Bulteno

redaktor: Tomáš Břicháček

t.brighacek@seznam.cz

Koran dankon al Pavol Petřík kaj
Markus Beyer pro lingvaj korektoj.

AKTUALAĴOJ

Kunvenoj en aprilo, majo kaj junio

APRILLO: la 9-an kaj la 23-an Duben: 9. 4. a 23.4.

MAJO: la 7-an kaj la 21-an Květen 7. 5. a 21. 5.

JUNIO: la 4-an kaj la 18-an Červen 4. 6. a 18. 6.

Kunvenoj komenciĝas je la 17-a horo Začátek vždy v 17 hod.

Programo de la kunvenoj estos prezentata en niaj interretaj paĝoj <http://bulteno.cs-retromusic.net/>.

Venontaj aranĝoj

2015/04/20-26 – La 41-a Lingva Seminario en Skokovy. Tradicia semajna seminario en familia pensiono ESPERO, kiu troviĝas en la pitoreska okcidenta parto de la sabloŝtona Bohemia Paradizo (norde de Prago), plena de diversspecaj turismaj allogaĵoj (kulturaj kaj naturaj). Antaŭtagmeze lingvoinstruado kaj lingvopraktikado diversgrada, posttagmeze ekskursoj, promenoj, ripozo, manlaboraj atelieroj, vespera amuziĝo, kantado, filmprojekciado ktp.

Info: drahotova@esperanto.cz

2015/04/23-26 – La 10-a Sabla Printempo - interreta seminario - en Skokovy. La ĉefa temo estos denove „SONREGISTRADO“ – trejnado pri realigo de voĉregistraĵoj (de tekstoj por lingvokursoj, beletro kaj prelegoj) kaj de muziko en komputilo en la programo Audacity. Eblas ankaŭ por absolutaj komencantoj!

Info: pavla.dvorakova@esperanto.cz

2015/04/24-26 – Junulara renkontiĝo CENTREJO 2 en Svitavy, kiu ĉifoje estos ĉefa aranĝo de festado de la 10-a datreveno de ĈEJ-refondiĝo.

Info: cxej@esperanto.cz

2015/04/25 – Regiona renkontiĝo en Moravská Třebová kaj Svitavy. Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy organizas tradicion renkontiĝon de Esperantistoj. Antaŭtagmeze vizito de Moravská Třebová, inkluzive ĝian renesancan kastelon. Reiro al Svitavy, komuna tagmanĝo, posttagmeze vojaĝprelego kun projekciado kaj amuza programo en la Esperanto-Muzeo.

Info: svitavy@esperanto.cz

2015/05/16 – Tradicia printempa renkontiĝo en Šumperk. Ĉiujara piedturisma renkontiĝo organizata de Esperanto-Klubo el Šumperk. Ĉi-foje ni netradicie malkovros surprizajn nekonatajn lokojn de la urbo mem. Eĉ se vi eĉ pli ol unufoje vizitis ĝin, sendube vi havas ion por antaŭĝoji!

Info: sumperk@esperanto.cz

2015/05/23-24 – La klubo E-mental' organizas en Chocerady edukan aranĝon *SELE – Semajnfina lernado*.

2015/06/14 – Tradicia renkontiĝo de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj Esperantistoj surpinte de la monto Granda Ĉantorio ĉe la ĉeĥa-pola landlimo.

Info: suchanekj@seznam.cz

2015/06/19 – Muzea nokto en Svitavy. Ĉi-foje la aranĝo (same kiel lastjare) ne estos ligita kun inaŭguro de la nova tutjara ekspozicio (tiu okazos nur fine de septembro). Posttagmeze eblos trarigardi en la Esperanto-Muzeo la nunan ekspozicion Esperanto kaj kolektado – krome estas preparata speciala programo rilate kolektadon (taŭga okazo por renkontiĝo de kolektemuloj!), filmprojekciado, vizito de urbovidindaĵoj kaj partopreno en netradicia vespera amuza programo, preparata far Urba Muzeo kaj Galerio.

Info: svitavy@esperanto.cz

2015/06/26-28 – Renkontiĝo de Katolika Sekcio de ĈEA en Svatá Hora en Příbram. Partopreno en matenaj sanktaj mesoj kaj vesperaj rozariaj preĝoj en la baziliko, sabate antaŭtagmeze trarigardo de la urbo Příbram, sabate posttagmeze trarigardo de la unika pilgrimareo Svatá Hora (*Sankta Monto*), prelego kaj diskuto kun prezidanto de la sekcio d-ro Max Kašparů, vespere interbabilado kaj projekciado el IKUE-aranĝoj.

Info: m.svacek@seznam.cz

2015/06/26-28 – Okazos la tradicia E-mentala gastronomia aranĝo *Viando* – ĉi-foje en Chotýčany.

Pasintaj aranĝoj

2014/12/04 – En la kunvenejo de EKP okazis prelego de Vlasta Piščíková pri la hispana regiono Katalunio.

2014/12/06 – La klubo E-mental' organizis en Freital socian kaj gastronomian aranĝon *Antaŭkristnaska kolbasumado en Saksio*.

2014/12/15 – La praga klubo de la Ĉeĥa Esperanto-Junularo organizis feston okaze de la Zamenhofa tago.

2014/12/18 – En la kunvenejo de EKP okazis la Antaŭkristnaska kunveno.

2014/12/19 – Český rozhlas Plus dediĉis sian programeron *Radiofórum* (19:10-19:40) al Esperanto. La subtitolo de la programero estis: *Má esperanto smysl, když je všude angličtina?* La ĉefa gastoj estis Tomáš Břicháček.

2014/12/20 – La klubo E-mental' kun slovakaj esperantistoj organizis en Bratislavo la socian aranĝon *Granda "lokŝumado"*. Estis renkontiĝo meze de Bratislavo kun vizito de antaŭkristnaska foiro, gustumado de slovakaj specialaĵoj "lokŝoj" kaj kristnaska grogo.

2015/01/15 – En la kunveno de EKP okazis prelego de Margit Turková pri František V. Lorenz kaj Stanislav Schulhof, Esperantistoj el Orienta Bohemio

2015/01/29 – En la kunveno de EKP okazis prelego de Petr Chrdle pri Přemysl Pitter

2015/02/28 – Okazis la tradicia renkontiĝo de la klubo E-mental en la praga bestĝardeno kun festo de "adoptotago" kaj granda konkursa pikniko.

2015/03/12 – En la kunveno de EKP Tomáš Břicháček prezentis tri novajn librojn: Rajko Doleček: *Inventura v 89 letech*, Marek Skřipický: *Případy inspektora Rádla*, Petr Fiala: *Na konci bezstarostnosti*

2015/03/20-22 – Okazis la 7-a BIERo (Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo) en Pelhřimov. Inter programeroj estis trarigardo de la urbo, muzeo de rekordoj, vizito de presejo, ludoj, testoj, bunta kutima matenmanĝegado.

Chcete dostávat Bulteno jen elektronicky?

Jednotlivým členům a dalším čtenářům, kteří dostávají Bulteno v tištěné podobě, bychom chtěli nabídnout ke zvážení možnost, že by náš časopis dostávali jen elektronicky v zájmu úspory nákladů. Elektronické vydání Bultena si může každý snadno vytisknout. Čtenáři, kteří jsou ochotni takto podpořit klub, ať se ozvou na e-mailovou adresu t.brichacek@seznam.cz.

La praga klubo en Facebook



Nia klubo havas nun sian paĝon en Facebook. Bonvolu viziti ĝin kaj aliĝi: www.facebook.com/bulteno. Vi povos komforte sekvi ĉiujn novaĵojn.

Aktualaj informoj estas nature ankaŭ en nia paĝaro:
<http://bulteno.cs-retromusic.net/>.

Jubileo de Helena Štruncová



S-anino **Helena Štruncová**, la iama prezidantino de nia klubo, fariĝos la 30-an de majo 2015 naŭdekjara!

La funkcion de la prezidanto de nia klubo ŝi plenumis inter la jaroj 1984-88 kaj tiu ĉi periodo apartenis al la plej bonaj kaj fekundaj en la historio de la klubo. Ŝi estis kursgvidanto kaj edukis vicon da Esperantistoj en sia kurso por progresantoj. Samtempe ŝi kontribuis al la kluba Bulteno, por kiu ŝi verkis kaj tradukis multajn artikolojn. Krome ŝi estis ankaŭ membro de la redakcia rondo de Starto. Post la jaro 1989 ŝi ne plu partoprenis la kunvenojn de nia klubo, sed tamen ĝis nun nian klubon ŝi malavare subtenas.

Al s-ino Helena Štruncová ni deziras ĉion bonan, precipe bonan sanon kaj multe da feliĉo en la vivo.

Kion diras nia kroniko pri la epoko de Helena Štruncová:

1984-05-01 la verda flago denove flagris dum la unumaja manifestacio, dank' al la praga E-junularo kaj precipe al s-anino Pavla Jodasová

1985-05-01 denova partopreno en unumaja manifestacio.

1986-01-27 surbendigita kompilaĵo de meditemaj versoj de Eli Urbanová voĉe de Eva Seemannová.

1986-02-24 la jarkunveno de la klubo elektis s-anon Jaroslav Mařík honora prezidanto de la klubo

1986-04-16 nia membrino, la mondkonata E-poetino Eli Urbanová estis elektita membro de Akademio de Esperanto

1986-05-15 en la matena programo „... a léta běží“ (kaj la jaroj pasas) la Ĉs. Radio elsendis la rakontadon de RNDr. Vlastislav Zázvorka, CSc., 83-jara laboranto de Nacia Muzeo kaj dum multaj jaroj direktoro de Nacia Muzeo, membro de nia klubo. Li diris, ke por siaj fakaj kontaktoj kun eksterlandaj sciencistoj li uzis ankaŭ Esperanton

1986 en aŭgusto gvidaj agantoj de Agado E, (Esperantistoj esperigas esperantojn) fruntloke kun s-ro J. A. Tuinder vizitis nian klubon kaj informis pri la Agado E. Oni funkciigis tri optikajn laborejojn en Ganao kaj pluan en Kamerunio, kiuj povas fari sian laboron dank' al la helpo de diverslandaj Esperantistoj, kiuj kolektis kaj forsendis kvantojn de malnovaj sed uzablaj

okulvitroj al Ganao. Grandan meriton pri tio havis nia membro Prof. D-ro Rudolf Horský.

1987-03-02 la kunvenoj okazas ĉiulunde en la nova klubejo en Kodanská str, en Praha - Vršovice

1987-06-01 rememoron pri Pigmaliono de Shaw en Esperanto kun elektitaj scenejoj dum nia klubkunveno prezentis: E. Seemannova, P. Sádlo kaj J. Ondráček



1987-09-23 solena koncerto okaze de la Centjariĝo de Esperanto kaj la 85-jariĝo de nia klubo en salonego de Klubo de lernejoj kaj sciencoj en Praha 1, Na Příkopě 10 - "Savarin". Mallongan bonvenigan paroladon prezentis la prezidantino de la klubo Helena Štruncová, la pluan programon profesie prezentis artistino Libuše Erbsová, kantis operkantistoj de la Nacia Teatro en Prago, ges-roj Dalibor kaj Sona Janotovi, Ludmila Greinerová, Luďa Dvořáková kaj Karel kaj Jindřiška Zemanovi, per piano akompanis ilin la direktanto de opero de Nacia Teatro s-ro B. Váchal. Ili kantis du bibliajn kantojn E-lingve (unu en traduko de Josef Vích), ariojn kaj duetojn el ĉeĥaj kaj mondaj operoj kaj operetoj, ĉeĥajn popolajn kaj artajn kantojn E-lingve kaj ĉeĥlingve. Prof. Pravoslav Sádlo-Páv ludis la duan parton de la violonĉela koncerto de Dvořák kaj la eniran monologon de Ifigenio sur Taŭrido de J. W. Goethe, tradukitan de Zamenhof, recitis la dramatistino Eva Seemannová.

1987-11-16 en parko en kvartalo Vršovice estis plantita Esperanta memorarbo - tilio je la 15-a horo kun ĉeesto de multaj Esperantistoj ne nur el Prago, sed ankaŭ el aliaj lokoj de nia lando.

1987-11-22 de la 13.30 h. en la klubejo en Kodanská str. estis aranĝita fulmrapida ŝak-turniro.

1987-11-23/29 en la klubejo en Vejvodova str. estis aranĝita ekspozicio de manlaboraĵoj (slojdoj), ekz. belaj kolore harmoniaj brodaĵoj, kroĉtrikaĵoj, braceletoj kaj kolieroj el ledoj, modernaj trikvestaĵoj kaj diversaj etaĵoj. Sendis ilin 16 Esperantistoj el Bohumín, Olomouc, Pardubice, Slavičín, Trutnov, Hradec Králové kaj Praha. La ekspozicion vizitis pli ol 350 homoj, kiuj aŭdis E-kantojn el bendoj kaj ricevis informojn kaj diversajn inform-materialojn.

Zemřel Karel Kraft

Pavla Dvořáková¹



11. ledna 2015 ve věku nedožitých 89 let nás po dlouhé nemoci navždy opustil čestný člen Českého esperantského svazu, slovníkář a pedagog a ve vícero ohledech vzácný člověk pan Karel Kraft.

Karel Kraft se narodil 24. února 1926. V době, kdy studoval na reálném gymnáziu v Příbrami, vypukla válka. Ze vzdoru vůči v protektorátu povinné němčině se učil tajně jako samouk anglicky a francouzsky a také rusky – s uprchlým ruským vězněm, kterého jeho rodina u sebe doma ukrývala. Před koncem války, místo aby se připravoval na maturitu, byl nasazen na povinné práce – složit maturitní zkoušku mohl až po skončení války. V květnu 1945 jako 19letý tajně převedl německého dezertéra do jeho domova v Bavorsku. Z touhy po dobrodružství se odtud přes okupační zóny v Německu dostal až do Francie. Protože však neměl požadovanou finanční částku, byl brzy uvězněn za potulku a společně s bývalými vězni z koncentračních táborů byl poslán zpět do Československa.

Touha po poznání světa a vědění o válečných i poválečných hrůzách ho vedly k hledání humanistických cílů. Zajímal se o hinduismus a další orientální filozofie a byl vegetariánem z přesvědčení, čímž se v tehdejší době stal pro mnohé podivínem.

Po válce absolvoval učitelský kurz a od r. 1950 začal pracovat jako učitel, postupně v několika venkovských školách na Příbramsku. Pro své nonkonformní politické i pedagogické názory, pro propagaci skautingu, pro svou morální

¹ S použitím biografických informací doplněných Miroslavem Malovcem do článku v esperantské Wikipedii.

zásadovost a koncem 60. let i členství v později zakázané „Společnosti pro lidská práva“ byl v nelibosti bývalého režimu, který mu důsledně bránil v uplatnění jeho všestranného talentu. V letech 1969–1989 nemohl působit ve školství a musel pracovat v uranových dolech v Příbrami a dalších dělnických profesích. Ke své pedagogické činnosti se mohl vrátit až po r. 1989; ještě po odchodu do důchodu řadu let pomáhal v místní škole vyučovat matematiku, angličtinu a informatiku.

V esperantském hnutí začal být aktivní od roku 1949, založil mj. kluby v Dobříši (1957) a Příbrami (1961) a zorganizoval Letní esperantský tábor ve svém bydlišti a působišti v Županovicích na Příbramsku (1958). Jako zkušený pedagog byl dlouholetým členem zkušební komise ČES. Přispíval pravidelně do japonských časopisů, do esperantského vysílání polského rozhlasu, měl čilé kontakty s esperantisty z mnoha zemí.

Znám je především jako hlavní autor obsáhlého *Česko-esperantského slovníku* a spolu s Miroslavem Malovcem i slovníku esperantsko-českého. Z esperanta do češtiny přeložil publikace „Základy učení vonbulismu“ (korejské formy buddhismu) a „Jak vyjednávat s Japonci“. Všechny zmíněné knihy vyšly v nakladatelství KAVA-PECH.

Napsal rovněž pozoruhodnou a velmi čtivou monografii *Heroo de amo* o vyjímečné filantropické osobnosti Přemysla Pittera, který mj. po válce vychovával společně osiřelé děti českého, židovského a německého původu, za což byl prohlášen v r. 1964 jako Spravedlivý mezi národy (vyd. nakl. KAVA-PECH). Knihu všem vřele doporučujeme k přečtení!

Z pestré celoživotní nezištné činnosti Karla Krafta v rámci hnutí jmenujme i málo známý fakt, že pomáhal i nevidomým a mj. dvacet let podporoval nevidomé esperantisty v Sovětském svazu, které prostřednictvím Braillova písma kontaktoval s ostatním esperantským slepeckým hnutím.

Odchod charismatické osobnosti pana Karla Krafta je pro společenství stoupců esperanta velkou ztrátou. Byl to mimořádný člověk – neutuchající nakažlivé touhy po poznání, rozsáhlých znalostí a obdivuhodného rozhledu i vhledu, ale také osobní odvahy a silného charakteru, píle a soustavnosti, i vnímavého a soucitného srdce.

Převzato ze stránek www.esperanto.cz

Forpasis Josef Vích

La 17-an de marto 2015 subite mortis s-ano Josef Vích, la kantisto de Nacia teatro en Prago. Li kantis esperantlingve operariojn kaj kantojn dum esperantaj aranĝoj kaj ankaŭ deklamis esperantlingve la poemojn de Věra Ludíková dum ŝiaj literaturaj vesperoj.

La funebran ceremonion la 24-an de marto en Strašnice partoprenis esperantistoj el Prago kaj Benešov.

Aperis nova ĉeĥa libro pri Petr Ginz

Jiří Patera



La eldonejo GEUM kaj la Gimnazio Natura Lernejo aperigis ampleksan libron (378-paĝan) de František Tichý „Princ se žlutou hvězdou“ (Reĝido kun flava stelo. La vivo kaj mirindaj migradoj de Petr Ginz.) La libro prezentas la vivon kaj aktivecojn de la knabo Petro Ginz, la filo de elstara juda ĉeĥa Esperantisto, literaturisto kaj redaktoro Ota Ginz. Fariĝinte 14-jara Petr devis forlasi sian familion kaj foriri en la judan getton en Terezín, kie li vivis kun aliaj judaj geknaboj. Tie kelkaj knaboj komencis eldonadi sekretan semajngazeton „Vedem“ (Ni gvidas) kun diversspecaj literaturaj tekstoj; la gazeto estas nun riĉa fonto pri la vivo en Terezín.

En la libro la aŭtoro abunde citas el verkoj de Petr Ginz kaj de aliaj aŭtoroj Chava Pressburger (la fratino de Petr), de Filip Mašek, Hanuš Hachenburg k. a.

La 16-an de januaro 2003 startis en Usono la raketoplano Columbia por 16-taga esplorvojaĝo tra la kosmo. Inter naŭ diversnaciaj astronautoj estis ankaŭ la unua israela astronauto Ilan Ramon, kies patrino travivis koncentrejon. Per sia kosma flugo li intencis honori la viktimojn de holokaŭsto kaj tial li kunprenis bildon de Luna pejzaĝo de Petr Ginz el la jeruzalema muzeo. Tial la kosma bildo de Petr Ginz sur la ferdeko de Columbia simbolis la realigon de la homaj revoj. Malbonŝance la eksplodo de Columbia dum la descendo la 1-an de februaro 2003 skuis la tutan mondon. La desegnaĵo de Petr Ginz ne revenis el la kosmo, la terura katastrofo okazis ĝuste en la tago, kiam Petr Ginz estus 75-jara. Tamen la nomo de Petr Ginz ne estis forgesita. Baldaŭ poste aperis ĉeĥa poŝtmarko kun la portreto de Petr kaj la bildo de lia Luna pejzaĝo. Poste nova strato en la praga kvartalo Záběhlice ricevis la nomon Ginzova. Kaj fine la Internacia Astronomia Asocio atribuis la nomojn de la naŭ pereintaj astronautoj al sennomaj asteroidoj moviĝantaj inter Marso kaj Jupitero ĉirkaŭ la Suno. Kaj la asteroido n-ro 50413 ricevis la nomon Petrginz.

La libron eldonis la eldonejo GEUM kun la Gimnazio Natura Lernejo en kunlaboro kun la korporacio Terezina Iniciativo, Muzeo Terezín, Juda Muzeo en Prago kaj la Yad Vashem Art Muzeum en Jeruzalemo en la jaro 2014. La eldono de la libro estis subvenciita per stipendio de Fondaĵo al la viktimoj de holokaŭsto en la programo Memorigo.

Esperanto v pořadu ČRo Plus Radiofórum (19. 12. 2014)

Úryvky z rozhovoru Petra Schwarze s Tomášem Břicháčkem

Co na esperantu považujete za nejcennější?

Lidé mají poměrně jasné představy o tom, co by měl ten mezinárodní jazyk, který se učí, splňovat. Tak asi chtějí, aby se jim zvýšily vyhlídky na dobré zaměstnání, aby se dokázali domluvit v hotelích, v restauracích, zeptat se na cestu na ulici a tak dále. Je pravda, že toto všechno esperanto nabídnout nemůže. Nicméně je stejně jako angličtina a jako jiné jazyky prostředkem komunikace. Má tu zvláštnost, že pokud chcete s někým mluvit, tak ho musíte v tom kterém státě vyhledat, což ovšem nebývá zas takový problém. Esperantisté jsou na internetu na různých seznamkách, na různých kontaktních listech, popřípadě můžete kontaktovat místní sdružení v tom městě, kam cestujete. A má to tedy tu výhodu, že už v tom cizím městě hned máte přátele, protože esperantisté jsou většinou velice rádi, když vidí jiné esperantisty z jiného státu, takže v tomto je to rozhodně přínosné. Já vidím ten základní smysl esperanta v tom, že je to prostředek k získávání kontaktů, přátel... V mnoha případech esperanto pomohlo i k navázání partnerských vztahů. Je velice mnoho manželství či partnerství, co vzniklo díky znalosti tohoto jazyka. Takže myslím si, že tady v tom to ten svůj smysl má.

Dá se říci, že do značné míry nejde o jazyk, ale o komunitu?

Je to jazyk, který se lidé učí dobrovolně, a tím se dá říct, že vytváří určitou komunitu, i když řekl bych, že je velice volná, protože řada lidí se pouze ten jazyk z nějakého zájmu naučí a není ani nikde organizovaná. Prostě nějak ho pak používají, nepoužívají. Někdy se opravdu stane, že na ně narazíte náhodou. Rozhodně to není nějaká sekta, jak si někdy někteří myslí. To může snad být případ některých nejradikálnějších, nezapálenějších esperantistů, ale to jsou v každé oblasti lidské činnosti nějaká nadšení...

Esperanto mělo za cíl stát se světovým jazykem, zajistit mír mezi národy. Spojujete si s ním také takové cíle? A mají šanci se uskutečnit?

Tak tady v tom případě záleží na každém esperantistovi, co si s tím za ty cíle spojuje. Já osobně jsem nikdy nebyl natolik ambiciózní. Já jsem si s tím spojoval asi to, co jsem před chvílí říkal. Po pravdě řečeno, když jsem se začínal učit, tak jsem ani jasnou představu neměl. Mě vždycky bavily jazyky, tak jsem se ho naučil jenom z toho důvodu. A pak jsem se sám divil, kde všude se dá uplatnit a kolik zajímavých zážitků s ním můžete mít, kolik kontaktů, cestování...

Říká se, že esperanto je mnohem jednodušší než běžné jazyky. Je to pravda?

Tak to je rozhodně pravda. Člověk znalý několika základních, nejrozšířenějších jazyků se ho dokáže naučit i v rádech týdnů, což třeba byl můj případ. A nejznámější učebnice dnes se jmenuje „Esperantem za tři měsíce“ a s ní se opravdu dá ten jazyk za tu dobu naučit.

Záleží na schopnostech každého člověka, jestli je jazykově nadaný a jestli má už znalost nějakého jiného jazyka, tak těm to jde samozřejmě nejlépe, nejrychleji. Pro ostatní je to třeba trochu více práce, ale stejně je to nesrovnatelně jednodušší proti jakémukoli národnímu jazyku, protože všechno je tam pravidelné, žádné výjimky, všechno je velice jednoduché.

Existuje esperantská literatura?

Existuje poměrně rozšířená literatura i přímo psaná v esperantu. Překladové samozřejmě je většina, ale je řada titulů přímo napsaných v esperantu. Z našeho prostředí třeba bych mohl připomenout básničku Eli Urbanovou životopisný román v esperantu a napsala také velice krásný životopisný román v esperantu. Bohužel tedy ty plody její práce nejsou přístupné neesperantistům.

Pozval byste něčím lidi, aby se učili esperanto?

I lidé bez velkých jazykových schopností mají díky esperantu možnost naučit se cizí jazyk a komunikovat s příslušníky jiných národů, možnost získávat známé, přátele – dokonce, jak říkám, najít si i životního partnera. To všechno to jsou krásné možnosti a myslím si, že esperanto především nikomu neškodí a je užitečné tomu, kdo ho umí nějak využít, ať už k těmhle věcem nebo třeba i k pouhé zábavě...

Diskusní příspěvek dr. Maxe Kašparů k uvedenému pořadu:

Samotná otázka mi v základním pojetí nedává smysl. Je obsahově podobná otázkám typu „...má smysl kupovat si jízdní kolo, když se všude dostaneš veřejnou dopravou?“ nebo „... má smysl pěstovat si na zahrádce vlastní zeleninu, když si všechno můžeš koupit v supermarketu?“ Eventuálně „...má smysl chovat poštovní holuby, když existuje pošta a internet?“

Ona otázka odpovídá duchu silně zmaterializované doby. Pěstuj ten jazyk, který ti umožní byznys, věnuj se jazyku, který ti pomůže společensky vystoupat výš, dělej to, co ti umožní prosperovat. Pokud budeme takto materialisticky uvažovat, je naše esperanto vsutku zbytečné. Ale ono je více než jazyk.

Vraťme se k onomu porovnání s bicyklem, zeleninou a poštovními holuby. Nevím o tom, že existují kluby a společenství lidí, kteří cestují autobusem, ale společenství cyklistů existují. Nevím, že by existovaly kluby přátel kupujících zeleninu v supermarketech, ale svazy a spolky zahrádkářů existují. Nevím o žádné společenské organizaci lidí, kteří fandí České poště, ale kluby chovatelů poštovních holubů jsou početné.

Při propagaci esperanta bychom měli hovořit především o oné, pro svět sekundární rovině. Vždyť právě ona je ve skutečnosti primární.

Přemysl Pitter

Karel Kraft



Následující text zařazujeme k poctě Karla Krafta (†11. ledna 2015) a v souvislosti s nedávnou přednáškou Petra Chrdleho na toto téma.

Přemysl Pitter (1895-1976) estis ĉeĥa humanisto, kiu zorgis pri forlasitaj infanoj ĉeĥaj, judaj kaj germanaj. Li lernis ankaŭ Esperanton. Por sia laboro li estis honorita per la germana Kruco de Merito, per honora doktoreco de universitato en Zuriko, per ordeno de T. G. Masaryk „in memoriam“ kaj per la israela titolo Justulo inter Nacioj. En 1995 lian 100-jaran jubileon omaĝis

Unesko.

Přemysl Pitter naskiĝis la 21-an de junio 1895 en Prago, lernis la metion de tipografo kaj presisto. Dum la unua mondmilito li rifuzis pafi kaj mem nur en lasta momento saviĝis de mortpuno. Li fariĝis konvinkita pacifisto kaj decidis dediĉi sian vivon al praktika kristanismo.

En 1924 kune kun la verkistino Pavla Moudrá li eldonadis la gazeton *Sbratření* (Kunfratiĝo) kaj fondis en Prago filion de la Movado por la Internacia Paco. Li laboris en Akademia YMCA, en Ligo por Homaj Rajtoj, en Internacio de Militrifuzantoj, propagandis abstinadon, vegetarismon kaj protektadon de bestoj. Sed lia plej grava ago estis la fondo de kooperativo por Milíč-domo en 1924 kaj la malfermo de la domo mem en 1933. La nomo estis prenita laŭ predikisto Jan Milíč el Kroměříž, kiu vivis dum la regado de Karolo la IV-a, kaj zorgis pri malriĉuloj. En la domo Pitter zorgis pri 150 infanoj, dum la milito li kaŝis precipe judajn infanojn, sed post la milito ankaŭ germanajn kaj edukis ilin komune. Tio postulis grandan kuraĝon, ĉar la malamo kontraŭ ĉio germana turniĝis ankaŭ kontraŭ infanoj. Post 1948 li estis sub kontrolo de ŝtata polico kaj en 1950 li devis fuĝi el la respubliko por ne finiĝi en uran-minejoj.

Li daŭrigis sian laboron ankaŭ en Svislando kaj Germanio. Lia kunlaborantino ekde 1926 estis la svisino Olga Fierz (1900-1990), kiu transloĝiĝis en Pragon kaj post 1950 daŭrigis la kunlaboron kun Pitter en Svislando. Ankaŭ ŝi ricevis la israelan titolon Justulo inter Nacioj. Ili laboris en tendaro por rifuĝintoj apud Nurenbergo, en la radio Libera Eŭropo, fondis Ĉeĥoslovakian Societon por Artoj kaj Sciencoj kaj verkis plurajn librojn. Přemysl Pitter mortis la 15-an de februaro 1976 en la svisa Zuriko.



Milič-domo

Přemysl Pitter kaj Esperanto

Přemysl Pitter favoris la ideon de la internacia lingvo, la lingvon de Frateco = Sbratření. Li komprenis ĝian lasttempan evoluon, kiu pligrandigas akcenton de la bezono de la pli bona globala interkompreniĝo pere de nehegemonieca, neŭtrala lingvo, sed li diris, ke tio estas tasko por tre longa marŝvojo.

Li skribis al unu el siaj korespondantoj en la jaro 1974 (ĉeĥlingve):

Nia lasta renkontiĝo ne malaperos el mia memoro. Ĝi elvokas ĉe mi memorojn je mia juneca esperantiĝo. Proksimume en la jaroj 1903 aŭ 1904 frekventis mia patrino Esperantajn kursojn kaj partoprenis klubajn programojn en kafejo „U Donátů“ en la strato Lazarská en Prago kaj mi akompanis ŝin. Foje mi dum ia festeno deklamis la poemon de Zamenhof „Forte ni staru, fratoj amataj, por nia sankta afero!“ Kun granda sukceso. En la kurso instruis la fratoj Kühnl. Unu el ili, inĝenieron, mi vizitadis en la strato de Ressler por adresoj de Esperantistoj-filatelistoj kaj mi interŝanĝis kun ili bildkartojn. Mi akiris multajn, el la tuta mondo. Tiam mi jam vizitis la unuan klason de gimnazio. La praga „Kurýr“ publikigis kvar bildkartojn (el Novzelando, Aŭstralio k.a.) kaj akompanis ilin flata artikoleto pri juna fervora ĉeĥa Esperantisto.


Mi ankoraŭ memoras kelkajn tiamajn membrojn de la klubo: la geedzojn Jiroušek el vendejo kun oficeja meblaro en strato Spálená, la barban studenton Kamarýt, kiun mi vizitadis en nova konstruaĵo de kemia instituto en la strato Na Slupi (Kamarýt fariĝis poste prezidanto de la Ĉeĥa Asocio de Esperantistoj kaj estis eminenta fakulo). Kiam mia patrino ekmalsanis, mi ĉesis vizitadi la klubon kaj tiamaniere finis mia esperantismo.

Mia intereso pri la internacia lingvo reviviĝis en la dudekaj jaroj, kiam mi vizitadis internaciajn packonferencojn. En tiu tempo mi jam Esperanton ne praktikis, sed mi proponis kune kun aliaj Esperantistoj alilandaj enkonduki en

nian traktadon Esperanton. La proponon oni akceptis, sed montriĝis, ke apud la angla, germana kaj franca lingvoj aldoniĝas lingvo kvara kaj anstataŭ simpligado okazas komplikado kaj tiel la eksperimento fiaskis. Kontribuis al tio ankoraŭ la idistoj kaj uzantoj de occidental kaj ili pligrandigis la galimation.

Krom ĉi tiu letero de Pitter mi trovis mencion en artikolo de lia kunlaborantino Olga Fierz. Sur la paĝo 30 de la preparata biografio estas mencio pri demonstra uzo de Esperanto sur podio dum internacia kurso en Hoddesdon por konvinki la aŭskultantaron pri la kapablo de Esperanto venki lingvajn barojn.

En la dudekaj jaroj eldonis Pitter kune kun verkistino Pavla Moudrá* gazeton Sbratření kaj tien ili envicigis kurson kaj regulan rubrikon pri Esperanto.



K. Kraft: *Heroo de amo. La vivo de Přemysl Pitter*

Životopis člověka, který věnoval svůj život práci pro děti a mládež z chudších společenských vrstev. Ihned po 2. světové válce se odvážil postavit proti křivdám páchaným na německých a židovských dětech. Po bolševickém puči musel opustit svou vlast a potom až do konce života pomáhal uprchlíkům ze sovětského bloku.

ISBN 80-85853-81-7 / 196 stran / 20 x 14 cm / brožovaná vazba

Informace na <http://www.kava-pech.cz/book-heroo-czech.html>

Magiaj arbustoj - malnova ĥinua mito

Pavel Rak

Foje, en praa tempo regis en Ĥinuo imperiestro, lia nomo estis skribita per du simboloj, la unua signifis Intelektto kaj la alia Sento, kaj li ankaŭ klopodis konduti laŭ tiuj simboloj, kiam li devis ion decidi, li lasis sian Intelekton gvidi lin, sed li aŭskultis iomete ankaŭ la Senton, liaj decidoj estis ĉiam saĝaj kaj justaj.

En la valo malproksime de la ĉefurbo estis malgranda vilaĝo, en kiu vivis riĉulo, kiun oni nomis Ĉagrenulo, kaj li klopodis pligrandigi siajn riĉaĵojn; malantaŭ la vilaĝo estis suden orienta deklivo, kiu tre plaĉis al li. Tie estus tre bona vinbergardeno, li opiniis dum sendormaj noktoj.

Sed meze de tiu deklivo estis kampeto de maljunulo kaj maljunulino, kiuj havis strangan deziron: ili volis kultivi grandegan florantan arbon, la plej belan en la mondo.

La riĉa Ĉagrenulo ne havis por ilia sonĝo ian komprenon; kiam ilia arbo iomete kreskis, li en la nokto alportis kaĝeton kun dek musoj, ĉe la arbo li faris truon kaj la musojn lasis ene.

La malsataj musoj kun granda apetito ekmanĝis la radikojn, dum mallonga tempo formanĝis ĉiujn kaj la arbo sekiĝis.

La gemaljunuloj estis tre malĝojaj, ili do plantis novan arbon kaj la riĉa Ĉagrenulo post mallonga tempo ripetis sian aĉaĵon.

Kiom ajn ili faris tion, ĉiu arbeto sekiĝis.

Ili certe vendos ilian kampeton al mi, planis Ĉagrenulo kaj koleris, ke ili atendas tiom longe.

Post iom da tempo komencis la malgaja maljunulo rakonti en la vilaĝo, ke li aĉetis magiajn semojn, kiuj kreskos sen akvo kaj ke ili havos kun la maljunulino en mallonga tempo ĝardeneton plenan de florantaj arboj!

Mi montros al vi “florantajn arbojn”, koleris Ĉagrenulo, ĉi tie estos vinbergardeno!

La avo kaj avino diligente ĉirkaŭpioĉis la kampeton, vilaĝanoj mokis, ĉijare estas granda seko, nenio kreskos sur via kampeto, ili antaŭdiris. Sed post kelkaj tagoj proksimume dudek kreskaĵoj verdiĝis surkampe.

Neniu volis kredi tion.

La duan tagon la kreskaĵoj estis grandaj kiel manplato, la trian tagon kiel ulno.

La vilaĝanoj venis rigardi tiun miraklon, staris apud la mureto, kiu ĉirkaŭis la kampeton kaj vidis, kiel la avo kaj avino diligente butas la etajn arbustojn.

Dum kelkaj tagoj la arbustoj estis altaj ĝis la korpomezo kaj plenaj je floroj.

La vilaĝanoj tre miris, neniu vidis tian miraklon antaŭe, Ĉagrenulo vane klopodis nokte eniri la kampeton, ĉar ĉiam aŭ avo aŭ avino ĉeestis kaj diligente laboris ĉirkaŭ la arbustoj.

Iun tagon ankaŭ la Imperia Moŝto aŭdis rakonton pri tiu ĉi miraklo kaj volis ekvidi tiujn belegajn florojn.

Kial mi ne havas tiujn miraklajn florojn en mia ĝardenego, li demandis siajn konsilantojn, sed neniu kapablis respondi kialon.

La Imperia Moŝto kun siaj akompanaj konsilantoj ekvojaĝis al la vilaĝeto, portistoj portis lin en palankeno ĝis la mureto ĉirkaŭanta la kampeton.

Mirigite ili rigardis la arbustojn, kiuj havis aron da multkoloraj floroj.

Mi volas vidi ilin de pli proksime, decidis la Imperia Moŝto.

“Vi malpurigos viajn silkajn brodornamentajn ŝuojn,” la avo klopodis ŝangi la decidon de la Moŝto, sed li jam ekpaŝis al la arbustoj.

Li klinis al la floroj, rigardis ilin de proksime, eksulkigis la frunton kaj mane montris, ke la avo kaj avino alpaŝu pli proksimen.

“Kion signifas ĉi tiu trompaĵo, la arbustoj estas el metaldratoj kaj la floroj el papero?” li demandis mallaŭte, lia voĉo vibris kolerege.

“Ni petas vian pardonon, via Imperia Moŝto, ni ne volis trompi vin, ni tion klarigos al vi!”

“Mi tion konsilegas al vi kaj faru tion rapide, aŭ ...”

“Ni estas jam maljunaj kaj ni havas tian revon, ni volus kreskigi belegan arbon, kiu ĉiuprintempe ekflorus kaj ĉiu vilaĝano ekmemoros nin.”

La loka riĉulo kontraŭas nian klopodon, li volas aĉeti nian kampeton je ĉiu prezo kaj intencas sur ĉi tiea deklivo konstrui vinbergardenon. Li faras ĉion eblan, por ke niu arbo sekiĝu, ĉiujare li faras ion malbonan.

Ĉar ni estas jam maljunaj, ni ekpensis ideon: en la vilaĝo ni diros, ke ni aĉetis miraklajn semojn kaj ke el ili baldaŭ elkreskas arbustoj kun belegaj floroj. En najbara vilaĝo ni aĉetis metalajn vergojn, dratojn, kolorajn paperojn. Ni faris proksimume dudek etajn kreskaĵojn, komencis prilabori la kampareton, ni komencis ĝin akvumi, kvankam regis seka vetero kaj dum la nokto ni enŝovis tiujn faritajn kreskaĵojn teren.

La sekvantan tagon ĉiuj miris, kion ni kreskigas tie. Ĉiam unu el ni estis sur la kampeto, la dua faris pli grandajn kreskaĵojn. Nokte ni enpikis pli grandajn kreskaĵojn kaj tiel ni faris proksimume dek tagojn. Kiam la vilaĝanoj staris apud la muro, ili ne eksciis, ke la arbustoj estas artaj, ili kredis, ke ĉi tie ekkreskis veraj magiaj arbustoj kun mirindaj floroj. Ĉiuj miris, kiel bele ili kreskas, kvankam jam longe regas seka vetero. Ni rapidis ĉion fini antaŭ la aŭtunaj pluvoj, antaŭ la akvo detruos niajn paperajn florojn. Tiam ni volis ĝustatempe ĉiujn arbustojn rikolti, la kampareton pributi kaj ni esperis, ke ĉiuj ankoraŭ longe rakontos pri niaj mirindaj floroj, kiam ni ne povis kreskigi veran grandan arbon pro la faroj de Ĉagrenulo.

Ni eĉ ne supozetas, ke la famo de niaj “floroj” disis ĝis via urbo kaj ke via Imperia Moŝto kun siaj servantoj venos rigardi ilin. Nun vi eble punegos nin je nia trompo kaj ĉiu ĉiam mokos pri ni.”

“Kiel vi sukcesis fari tiom da arbaretoj kun mirindaj floroj?” demandis la Imperia Moŝto.

“Kiam homo havas revon, li klopodas ĝin verigi kaj plenumi; ni elspezis ĉiun nian monon, laboris tage nokte, ĉiam unu sur la kampareto, la alia fleksis dratojn, faris arbustojn, kreis florojn...”.



Ilustraĵo de la aŭtoro

“Montru al mi viajn manojn!” ordonis la Imperia Moŝto kaj la avo kaj avino streĉis siajn manojn, ili timis, ke ili estos severe punitaj.

La Imperia Moŝto ekvidis du parojn da manoj, kiajn li antaŭe dumvive neniam vidis.

Li mem havis blankajn manojn kun delikata haŭto, ĉiutage la servantoj ŝmiris liajn manplatojn per bonodoraj oleoj. Ankaŭ la aliaj anoj de lia akompana sekvantaro havis belajn blankajn manojn ornamitaj per fingro-ringoj kaj braceletoj.

Kaj nun li subite ekvidis tute aliajn manojn, nigraj de argilo, plenaj de kaloj, sekvo de tutviva laboregado, manoj plenaj je sangaj vundoj faritaj de metaldratoj, kiam la geavoj kreis tiujn arbustojn!

La Imperia Moŝto etendis la manojn kaj prenis en siajn manplatojn la manojn de la geavoj.

Anoj de lia akompanaro, kiuj staris malantaŭ la mureto kaj vidis ĉion, kio okazis, sed ne aŭdis, kio estis dirite, ne komprenis, kio okazis; neniam antaŭe la Imperia Moŝto tuŝis ordinarajn homojn!

La Imperia Moŝto fermis la okulojn kaj ekpensis, kiel punigi tiujn du maljunajn naivajn homojn pro ilia trompaĵo. Kaj subite li eksentis en siaj fermitaj okuloj

strangan, ĝis nun neniam sentitan malsekon kaj sur liaj vangoj komencis io flui malsupren.

Ankaŭ la avo kaj avino havis fermitajn okulojn, ili sentis la varmon de la manoj de Imperia Moŝto kaj pro timo ili eĉ ne spiretis. Subite ili sentis, ke io falis en iliajn manojn, ili malrapide malfermis la okulojn kaj ĉiu ekvidis sur sia nigra manplato grandan larmoguton, kiu en la matena suno brilis kiel diamanto.

Karaj legantoj, vi certe volus ekscii, kiel decidis la Imperia Moŝto. Provu imagi, kiel vi farus, se vi estus en lia loko. Se vi volas, skribu al ni vian decidon kaj en la venonta eldono de la gazeto ni publikigos kelke da viaj “verdiktoj” kaj vi ankaŭ ekscios, kiel verdiktis la Imperia Moŝto.

Pragaj preĝoj

Jana Cíhová-Hrdličková

*Por vesperoj, en kiuj mi komencis kompreni
la parolon de malhelaj statuoj
kun fidema timo
kun fantomoj en nebularo
post sunsubiro mi paroladis,
por la momentoj, kiam mi
en silenta nokto manglatigis
la silentajn kvadratojn de preĝejaj muroj,
por la matenoj,
kiuj ekfajretis en koloroj
sur bordoj de la rivero
de Dio disŝprucigitaj
desur krea paletro, sur riverbordoj,
de la rivero belega kaj dolĉa
kiel knabina talio
por silenta meditado de katoj,
kiuj revis malantaŭ fenestroj
kaj dum krepuskoj,
por fidela verdeceto de Sta Nikolaa kupolo
por ondobatado de ĝardenoj
sub Strahov,
por anseroj, kiujn mi foje vidis,
nur unufoje darfis ekvidi
el eta lageto trinki.*

*Por ombroj, resonoj kaj vagadoj,
por tio ĉio, je kio mi pli riĉa estis
kaj kio min travivigis
kapturnigan infanecon
de ĝojo kaj feliĉo –
por tio mi volis iel danki al Praha,
Al la urbo kara, tiom kara....*

*Danko estas miaj preĝoj,
eĉ kiam mi scias, ke ili estas
nur trementanta rebrilo de momentoj
ĝis la senfino etendiĝintaj...
Kaj malgraŭ ĉio ni ŝate
al ili submetiĝas –
al tiuj momentoj, al tiuj steloj,
al tiuj rememoroj,
kiel al folieto, kiu desur roza floro
falas en la paĝojn de volvoĝinta libro,
kiun delonge iu jam deponis.
Nur ĝin malfermi,
nur legi per sia tuta koro...*



Jana Cíhová Hrdličková (1923-2014) estis Esperanto-poetino kaj iama membrino de nia klubo. Ŝi aktivis en la virina komisiono de Mondpaca Esperanto-Movado, estis ekzamenita E-gvidistino en Prago, partoprenis en la E-anguloj en poraŭstraj elsendoj de la Ĉeĥoslovaka Radio. Ŝi estis fekunda tradukistino de la ĉeĥa poezio (ekz. En Paco. La Suda Stelo, Norda Prismo, Oomoto) kaj aŭtorino de poemoj: Liriko intima, Kvar sezonoj, Pragaj preĝoj, Signo de ekkrio. Ŝi estis honora membrino de ĈEA.

Zítřka už bude všechno jinak

Tomáš Břicháček

Krátké úryvky z první kapitoly románu na pokračování z daleké budoucnosti České republiky (přibližně z let 2081-2103). Román je dostupný na autorově blogu na stránkách iDNES.cz <http://brichacek.blog.idnes.cz/> a na Facebooku na stránce <https://www.facebook.com/zitravsejinak>. Román spadá do žánru politické fikce a antiutopie.

neděle 28. září 2081

Na konci září už je dobře patrné, že dny se zkracují, zatímco noc se hlásí o slovo čím dál dříve. Bylo něco po půl osmé večer a nebe bylo temně modré až černé. Alespoň se takovým zdálo být z centra Malého Istanbulu, které tonulo v záplavě světél a barevných neonových nápisů. Po setmění se tento kout Prahy, který zabíral východní část Holešovic mezi Argentinskou ulicí a Vltavou, pravidelně proměnil v dějiště pulzujícího nočního života. Probudily se desítky restaurací, barů a klubů, kabaret „Konstantinopolis“ se oblékl do červeného nasvícení, na kulturním domě „Fabrika“ s archaickým vzhledem se rozzářily nápisy „Tiyatro“ a „Sinema“. Ulice ovládly davy lidí, halas, smích, hudba, vůně jídel, parfémů žen. Nejinak tomu mělo být i v tento nedělní večer, který právě začínal.

Většina ruchu se soustředí na dvě hlavní třídy, po kterých jezdí tramvaje. Červené cedule s bílými nápisy a modrobílým lemem je označují jako „Komunardů“ a „Dělnickou“, ale takhle je tu sotvakdo zná. Té první si noví obyvatelé navykli říkat İstiklâl Caddesi podle velevýznamné istanbulske ulice. Pro tu druhou se podle Libeňského mostu, k němuž vede, vžil název Köprü Caddesi².

[...]

Bylo tři čtvrtě na deset, když Demirel s plukovníkem nasedali před restaurací do taxíku. Vůz se rozjel Dělnickou ulicí směrem k centru. „Uděláme si menší zajížděku. Na křižovatce to vezměte doprava a potom pojedeme kolem nádraží Holešovice,“ instruoval Demirel česky vietnamského taxikáře. Za malou chvíli už odbočili na Argentinskou.

Za prvním blokem domů se otevřel výhled na veliké staveniště osvětlené silnými reflektory. „Hm, vidím, že se pracuje i v noci,“ poznamenal plukovník a pozorně si prohlížel, jak stavební dělníci a stroje kmitají kolem mohutné železobetonové konstrukce rostoucí do výšky. Během několika měsíců se z ní měla vyklubat největší mešita v republice, schopná pojmout až 7000 lidí. „Ano, přesně tak, od osmi ráno až do deseti hodin večer sedm dní v týdnu,“ řekl Demirel. „Není důvod otálet. Čím dříve budou hotovi, tím lépe. Byli bychom rádi, aby inaugurace mohla proběhnout k patnáctému výročí příchodu prvních osadníků, tedy v červnu příštího roku.“ „Velmi správně,“ řekl tiše plukovník. „Velmi správně!“

² Köprü = turecky most, caddesi = turecky ulice.

[...]

„Celkem vzato, musíte být šťastný člověk, kapitáne,“ poznamenal plukovník zamyšleně zahleděn do žhavé špičky doutníku. „Máte povolání, ve kterém můžete prokázat nejlepší služby svoji vlasti, máte útulný domov, krásnou manželku, velkou rodinu... Mnozí vám mohou závidět.“ Natáhl z doutníku, vydechl kouř a dodal s nádechem trpkosti: „To mojí rodinou byla vždy pouze a jen *Millî İstihbarat Teşkilatı*³ a ani to jinak nešlo v mojí pozici...“

Demirel přes stůl opatrně sledoval svého společníka a raději převaloval v ústech lahodný kouř připomínající dálný Karibik, než by dál rozvíjel diskusi směrem k soukromým věcem.

„No nic,“ pokračoval Mataraci. „Co je rozhodující, máte vůdcovské schopnosti, máte znalosti místních reálií, pílí, máte výbornou pověst mezi naší komunitou. Ústředí má ve vás důvěru. Jsem přesvědčen, že ji nezklamete. Netřeba zdůrazňovat, že ji ani zklamat nesmíte! Jde o příliš mnoho. Místo muže číslo jedna osidlovacího programu v této zemi bude mít v dalších letech klíčový význam. Pro vládu i *MİT* je zdejší mise prioritou.“

Plukovník si dopřál poctivou dávku koňaku a pokračoval: „Čekají nás velké věci, kapitáne. Evropa, jak jsme ji znali po staletí, je na kolenou a rozpadá se před očima. Nebude to trvat ani půlstoletí a bude konec. Všichni víme, že západní národy zdegenerovaly, ztratily schopnost se reprodukovat, ať už fyzicky či duchovně, rozpadl se morální řád, náboženství, disciplína, pohlaví, společnost se rozložila na molekuly. Jakákoli představa o tom, co je normální, a co ne padla. Všechny krysy lezou z kanálů a derou se o svoje místo na slunci. My Turci musíme být připraveni na novou situaci a musíme být připraveni lépe než naši soupeři.“

„Nemějte obavy, plukovníku, jsem si zcela vědom důležitosti svého poslání,“ řekl Demirel. „Osidlovací program v této zemi je celý můj život. Jsem mu plně oddán a dělám vše pro jeho úspěch. Věřím, že ústředí za námi vidí výsledky. Za uplynulých čtrnáct a půl roku jsme dokázali vytvořit dobré základy pro další rozvoj. Konečně nejlepším dokladem toho jsou čísla. Republika má dnes 8,3 milionu obyvatel, přičemž našich je z toho už 2,7 milionu. Starousedlíků je 5,1 milionů a toto číslo bude poměrně rychle klesat. Přistěhovalců z jiných zemí je tu asi půl milionu.“

„A tady v Praze je nás přesně kolik?“ zeptal se plukovník.

„O něco více než 350 tisíc, přičemž Praha má celkem 1,4 milionu obyvatel,“ odpověděl Demirel.

Plukovník natáhl z doutníku a pomalu vydechl obláček kouře. „A jak si představujete vývoj do budoucna?“

Demirel řekl: „Inu Bayraktar má za to, že za stávajícího stavu můžeme nadále spoléhat především na přirozený běh věcí. Říká, že se jednak nadále uspokojivě rozrůstáme na základě porodnosti, jednak budou přicházet další osadníci, na straně starousedlíků pak nepředpokládá zvrát v trendu rychlého přirozeného úbytku. Vše je tak podle něj do značné míry jen otázkou času a trpělivosti.“

³ *Tur.* Národní zpravodajská organizace - zkratka *MİT* – turecká tajná služba

„A vy jste téhož názoru?“ zeptal se Mataraci dívaje se významně na svého podřízeného. Ten z plukovníkova tónu zřetelně vycítil, že je po něm vyžadován přístup aktivnější.

„Ne tak docela,“ odpověděl Demirel. „I já říkám, *sabır acidır, meyvesi tatlıdır*⁴ a rádím neunáhlovat se. Na druhou stranu se domnívám, že jsme ve fázi, kdy je třeba se posunout dále. Rüzgar Bayraktar byl výborným vedoucím pro první fázi, kterou můžeme nazvat jako administrativně-technickou, logistickou, úřednickou, tedy pokud šlo o zařízení transferu obyvatel, rozdělování domů, bytů, přebírání škol, kostelů... To vše zvládl dokonale. Na čem je třeba zapracovat nyní podle mého názoru, to je práce s našimi lidmi...“

Plukovník vztyčil ukazováček. „Tak! Velmi správně. Vidím, kapitáne, že jste pochopil situaci. Jaký je další základní pilíř práce *MIT*? Dokázat dát věci do pohybu... a samozřejmě nebýt přítom vidět. To byl přece váš obor, než jste byl přidělen na tuto misi. Tenkrát v čtyřiašedesátém – masové nepokoje a stávka v Düsseldorfu, na tom jste si přece udělal jméno.“

Demirel drže sklenku koňaku proti světlu a prohlížeje jeho barvu se usmál a s nostalgií v hlase řekl: „To už je opravdu dávno. Léta mládí! Vzpomínky staré málem jak tento archivní koňak.“ Pohlédl na plukovníka: „Jen jestli se ze mě za posledních patnáct let nestal spíš úředník.“

„Toho bych se nebál, ‚strýčku Arhane‘,“ řekl plukovník.

Zbytek noční schůzky se dále nesl v duchu kubánského tabáku, koňaku, vzpomínek i výhledů do budoucna. Jistě vlivem ušlechtilého alkoholu i vzájemného porozumění se Mataraci Demirelovi ke konci na místo odcizeného robota zdál být přece jenom alespoň trochu člověkem z masa a kostí. Bylo krátce před půlnocí, když plukovník požádal Demirela o objednání taxi na cestu do rezidence ambasády v Pevnostní ulici, kde byl ubytován. Demirel nabídl svému hostu, aby se před odchodem ještě zastavili na terase a vychutnali si výhled na město.

Stanuli na terase v chladné hvězdnaté noci. Dole se otevíral majestátní výhled na tisíce světél zářící Prahy. Oba Turci v tichosti sledovali okouzující scénérii. Kostel svatého Matěje začal odbíjet půlnoc. „Nádherné město, nádherné,“ vydechl Mataraci. Jeho jazyk byl už mírně unaven. „Bim, bam, bim... Slyšíte? Zvony zvoní, hodiny tikají. Víte, co je na tom nejúžasnější? S každou vteřinou je tohle město víc a víc naše a méně a méně jejich...“ Oči mu plály jako světla metropole v údolí.



⁴ Turecké přísloví: *Trpělivost je hořká, ale její ovoce je sladké.*

Litovia Esperantisto en la Eŭropa Komisiono

Povilas Jegorovas



En novembro 2014 ekfunkciis la nova Eŭropa Komisiono (EK) – plenumorgano de la Eŭropa Unio (EU). EK, foje nomata registaro de EU, konsistanta el 28 membroj – po unu el ĉiu lando de EU. Litovion en ĝi reprezentas **Vytenis Povilas Andriukaitis**, EK-ano pri sanprotektado kaj sekureco de manĝaĵoj, kiu scipovas kaj subtenas Esperanton.

En 1976 Andriukaitis laboris kiel kirurgo en la hospitalo de la distrikta urbo Ignalina, kaj dum noktaj deĵoroj, kiam mankis laboro, li memstare studis Esperanton. Al Esperanto lin kondukis la Esperantisto kaj medicinisto

Viktoras Kutorga (jam forpasinta). Ekde 1976 Vytenis Andriukaitis ofte vizitis la ĉiusemajnajn kunvenojn de la Esperanto-klubo en Vilno, kiun tiutempe gvidis la medicinisto kaj tre aktiva Esperantisto Adomas Vaitilavičius (1915–1996).

Vytenis Povilas Andriukaitis naskiĝis en 1951 en siberia ekzilo (vilaĝo Kjusjur en Jakutio). Li revenis al Litovio en 1958, studis en la medicina instituto en Kaŭno (1969–1975); laboris kiel kirurgo en Ignalina, Kaŭno kaj Vilno. Koresponde studis en la Vilna universitato kaj en 1984 ricevis diplomon de historiisto.

Li aktive partoprenis en la kontraŭsovetia movado por la sendependiĝo de Litovio ankoraŭ dum la Sovetia periodo. Ekde 1990 ĝis 2012 li estis parlamentano (krom la periodo 2004–2008). Dum 2000–2004 li estis vicprezidanto de la parlamento. Kaj ekde 2012 ĝis 2014 li estis ministro pri sanprotektado de Litovio. Li estas vicprezidanto de Litovia Socialdemokrata Partio.

Pro sia politika agado Andriukaitis iom deflankiĝis de Esperanto, tamen neniam ĝin forgesis kaj, laŭ siaj ebloj, helpis al Litova Esperanto-Asocio (LEA). En 1996 li kun du aliaj parlamentanoj-Esperantistoj Mečislovas Treinys kaj Antanas Račas oficiale akceptis la tiutempan prezidanton de UEA, prof Lee Chong-Yeong. Dum lia laboro en la parlamento mi kiel prezidanto de LEA kelkfoje vizitis lin pro diversaj aferoj, ĉefe pro la organizado de la 90-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Vilno en 2005. Krom Esperante kaj litove, li parolas pole, angle, ruse kaj germane. Li estas edziĝinta kaj havas tri infanojn.

Transprenita el la revuo *La Ondo de Esperanto*, 2015, №3.
(Rete: *La Balta Ondo* <http://sezonoj.ru/2015/02/litovio-7/>)



B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Praha
Časopis Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Odesílatel:

Klub esperantistů v Praze

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7